



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORÍA - DIREKTORO: RAMÓN DE SALAS

Administracio kaj Redakelo: Str. RODA, n.º 14-16

Nia Literatura Konkurso

Laŭ rezulto de la baloto pri la merito de ĉiu el la laboraĵoj senditaj por partopreni nian literaturan konkurson, post kiam oni ekkonis la opinion de ĉiu el la juĝantoj antaŭe atente kaj detale ekzamenintaj unuope ilin, la ĉitrea juĝantaro decidis premii la jenajn verkojn:

Temo	Premio	Lemo	Aŭtoro	Urbo
1. ^a	Premio	Vilaĝaj Siluetoj	Ricardo Quiles	Valencio
	Duonpremio	Poŝtkarto	Petro Marqueta	Zaragoza
2. ^a	Duonpremio	Hirundo	Amalia Núñez	Pamplono
3. ^a	Premio	Espero	Petro Marqueta	Zaragoza

La tuta juĝantaro konsistis el Sroj. Inglada, Vázquez kaj Soler el Madrido kaj Sroj. Orós, Salas, Artigas kaj Martínez el Zaragoza.

Niajn varmajn gratulojn por la gepremiitoj.

Duonpremüta Traduko el la 2.^a Temo

DEVIZO: HIRUNDO

Sur la maron nubgutet'
falas iam el ĉielo;
tuj levigas marnivelo;
ĝin ne sentas markviet'.

Sekve de studad' sen fin'
homo iun veron semas.
Malgraŭ ke la mondo tremas
la homar' ne vidas ĝin.

Grandajn rondojn sur la mar'
Strekas post fal' la akvero,
kaj ricevas per la vero
novan vivon la homar'.

Ŝprucu, penso, do sen lac':
daŭru la semad' kultura.
Scias mi, ke pro gut' nura
plialtiĝas marsurfac'.

AMALIA NÚÑEZ.

Pamplono.

Premüta Artikolo el la 1.^a Temo

VILAĜAJ SILUETOJ

En unu el tiaj vilaĝoj el kelkcent loĝantoj, kien neniam envenas eĉ unu ĵurnalo, kie la antikvaj petrollampoj ankoraŭ vantas pri moderneco kaj kies kampulaj domaĉetoj kunpremiĝas ĉirkaŭ la preĝejturo, kvazaŭ sentante froston aŭ timon antaŭ la tempokurado, dek aŭ dek-du nigraj siluetoj suprentrenas sin tra krutaj malrektaj stratoj kaj fine eniĝas ĉe sinjoron Petro, unu el la deko de la lokaj vilaĝanoj scipovantaj legi kaj skribi, kiu de antaŭ kelkaj tagoj ĝuigadas tiujn simplanimajn vilaĝanojn per kelkpaĝa legaĉo de granda romano, kiun la nuntempa posedanto heredis de siaj prauloj. Tiu dika volumo bruligas la aŭdantaron per la scivolema flamo de la mistero. Al ilia rutina, senhorizonta, peniga ekzistado alkroĉiĝis la fantaziaj okazajoj de la rakonto, kaj la fabela farso plena je amo kaj malamo, plena je sango kaj intrigo enrudigis en la realan monotonon de la vilaĝanoj, kiuj ĉiutage dum unu horo sin alkroĉas al la lipoj de sinjoro Petro, kiu per sia magia verko havas la mirindan virton sekigi ĉies buŝojn kaj elglitigi sur la afliktomienajn vangojn, abundajn, amarajn larmojn...

Diligentaj kiel studentoj, la ĉiutagaj aŭskultantoj alvenas akurate kaj eksidas sur kutimajn sidlokojn: la virinoj kaj la plenaĝuloj, surseĝen; la junuloj surteren ĉe la muro. Ĉies vizaĝoj fikse turnitaj al la legotablo, samkiel antaŭ iu scenejo, aperas palaj, streĉitaj kaj en ĉiu okulo brilas kvazaŭ freneza avideco kiu timplene kunpremiĝas ilin ĉiujn. La virinoj, pretaj ploradi, elpoŝigas grandan poŝtukon; la viroj ankaŭ ne povas kaŝi sian konsterniĝon.

Ĉe la malfermo de la verko, kvazaŭ infektitaj unuj de la aliaj, ĉiuj samtempe eksentas fortan skuon de timo kaj frosto...

Ĉu estas eble, ke tiu dika libro plena je enigmaj signoj entenas tiom da eksterordinaraj mirindaĵoj? Sur ĝi oni parolas pri marmoraj tre grandaj palacoj, kiajn neniu iam vidis; pri neimageblaj vojaĝoj kaj aventuroj en fantaziaj landoj; pri

sklavinoj kiuj fariĝis princinoj per sorĉo de amo...

Ho, kiel terure, se nun sinjoro Petro ĉesigus subite la legadon! Sed, ne; kvankam malrapide kaj ne tre bone, la vilaĝleganto daŭrigas, ravante ĉiujn per la fabelaj rakontoj de la mirinda libreto.

Dank'al sinjoro Petro, dek aŭ dek-du simplanimuloj lin ĉirkaŭantaj, forgesinte siajn mizerajn vivkondiĉojn, travivas aliulajn vivojn, kaj dum unu horo, la koboldo de la nekonateco alŝovas emociajn korbatojn en la senimagajn animojn de la vilaĝaj siluetoj...

RICARDO QUILES.

Valencio.

Premiata Artikolo el la 3-a Temo

Lemo «Espero»

La tempolimo ne estas tro malproksima, por ke oni povu aranĝi la aferon tiel detale, kiel ja ĝi indas. Vere ĉi tiu temo estas interese. Tamen, skize, mi penas kolekti laŭorde kelkajn sugestiojn pri tio, kio povus esti la organizado de la Esperanto-movado kaj ĝia propagando en nia lando.

NACIA GVIDANTARO.—Kompreneble, ni pensu unue pri unu Nacia Gvidantaro, kiu estu kiel eble plej forta. Ĝi povus loĝi en hispana urbo, kie la esperanto-movado estas plej grava, kie ĝi havas plej taŭgajn homojn. Ni ne parolu pri la neceso de entuziasmaj esperantistoj. Tio estas memkomprenebla.

Prezidanto, Vicprezidanto, Sekretario, Kasisto ktp., laŭ bezono. Tio ne gravas. Sed oni postulu al ĉiuj: aktivecon, aktivecon... kaj aktivecon ankoraŭ.

KARAKTERIZA LABORO ESTUS.—Gvidi la Esperanto-movadon. Tiel do, reprezenti la Nacian Movadon en internaciaj esperanto-aferoj. Ĉiujare N. G. devas entrepreni la organizadon de komuna vojaĝo de hispanaj esperantistoj al la Internacia Kongreso de Esperanto. Dezirinde estas, ke tiu ĉi vojaĝo estu komuna. Tiel, certe estos pli da profito por la partoprenantoj. Tiamaniere oni instigus la hispanajn esperantistojn al unueco. Tio estas necesega.

Aliajn vojaĝojn, vizitojn kaj, ĉefe, interŝanĝojn de vizitoj, povus entrepreni N. G. Pro tio nur aktivaj homoj povas konsistigi ĝin.

Tre konvena por la disvastigado de niaj idealoj estus la organizado de Nacia Kongreso de Esperanto, ĉu jara, ĉu dujara. Tio estas nedubeble granda propagando por nia afero. Do, oni profitu saĝe. Rimarku, ke mi diras saĝe. La urbo de la Kongreso povus esti elektita inter tiuj, kiuj havas pli da entuziasmaj esperantistoj, kaj kie aliaj kondiĉoj garantias plej interesan kaj sukcesplenan efektivigon. Vere studinda afero estas tiu ĉi.

Ĉu ne estus interese aranĝi nacian statistikon pri nia movado?... Oni povus publikigi libron (jarlibron), en kiu estus troveblaj ĉiuspecaj detaloj pri organizo, disvastigado, aktiveco ktp. de nia movado en la tuta lando.

Eldono de oficiala, grava revuo devas esti unu el la plej entreprenindaj aferoj. Pere de tiu ĉi komuna voĉo estus kunigitaj la esperantistoj el ĉiuj partoj de nia lando. Kunigite senescepte, ni ĉiuj povus labori en ĝi por plivastigi nian kampon. Izolitaj homoj, kluboj malmulte povas fari. Taŭ-

ga ĝi estus ankaŭ, kiel entuziasmigilo, pere de senombraj rimedoj.

Propaganda fako devas esti unu el la ĉefaj organizoj de N. G. Sed pri tio mi parolos poste. Turisman servon oni klopodu organizi, eble helpe de P. N. T. Tio montrus ĉie, ke esperanto vere utilas. Kaj ni ja bezonas konvinki ĉiujn pri tio ĉi. Aliaj aferoj estas: diplomoj, konkursoj, rekompencoj por la laboremo ktp., kiujn ni ne pritraktas, ĉar ne estas sufiĉa spaco.

REGIONAJ FAKOJ.—Preskaŭ sama labro kaj organizo kiel N. G. Sed nun jam la laboro rilatas ĉefe la regionon. Ili povus esti ligiloj inter la esperantistoj kaj N. G. Ilia laboro celus instigi al aktiveco la grupojn kaj klubojn de esperanto. Organizo de vizitoj, lekcionoj, eĉ kursoj. Laŭ mia opinio (ĉu ne, Sro. Salas?) definitiva enkonduko de esperanto nur venos pere de tiuj, kiuj praktike uzos la lingvon. Do, estas necese, ke tiu regiona fako de N. G. instigu ilin al esperanto-studado. Instruistoj, skoltoj, junularoj ktp. estas tiurilate rimarkinda kampo por tia laboro.

KLUBOJ.—El ili konsistas la plej efika parto de nia movado. La kluboj de esperanto estas, kiuj laboradas plej proksime de la estonta ano, do, ĝia laboro devas esti bone organizita kaj entuziasme aranĝita. Laboro por ili devas ĉiam esti:

Klarigado de kursoj, ĉar pere de ili oni akiros pli kaj pli da adeptoj. Oni ĉiam aranĝu la aferon serioze kaj vigle, ĉar tiel estas konvene. Necese estas, ke veninta lernanto trovu nian celon kaj movadon alloga. Ĉio alia venos per si mem.

Esperanta biblioteko. Interese laboro. Sed oni ne nur posedu ĝin. Instigu la anojn de la klubo al ĝia uzado kaj al elĉerpado de konoj. Se ili estas konstantaj legantoj de esperantaj verkoj, tiam facile ili estos bonaj esperantistoj, ĉar kiu legas, tiu kutimiĝas al vera kaj trafa esperanto-uzado. Bonega afero, se la klubo povas havi revuaron. Ĝi estas tiel instrua, kiel biblioteko, kaj eble pli amuza, ĉar estas malpli peza.

PAROLVESPEROJ.—Tio estas tre bela parto de esperanta laboro. Mi rakontu, kiamaniere la skoltoj de Budapeŝto aranĝas ilin:

En difinita tago de ĉiu semajno kunvenas la membroj de esperanto-rondo. Tiam laŭorde ili rakontas laŭte al la aŭskultantoj la esperantajn novaĵojn, pri kiuj ili sciigis dum la pasinta semajno. Tio estas interese. Ankaŭ ĉiam unu el ili devas pritrakti iun difinitan temon. Oni finas la kunvenon per diskutado de planoj de estonta agado. Ili laboregas por konkeri ĉiam pli kaj pli da anoj. Ĉu ĝi ne estas entrepreninda afero por niaj esperantaj kluboj?

EKSPOZICIOJ.—Interese estus, se la kluboj entreprenus ilian aranĝadon. Malgrandaj ekspozicioj de poŝtkartoj, revuoj, markoj ktp. kiuj montru utilecon de esperanto.

Fine, estas ankaŭ vojaĝetoj, ekskursoj, radiaŭdadoj, sportoj ktp...

Laŭ mia opinio oni erare agis ĝis nun. Eble oni ne komprenis, ke nia celo bezonas propagandon, propagandon kaj propagandon. Tio estas grava afero. Oni bezonas ĉiam la helpon de aktivaj membroj kaj pro tio ni devas klopodi venigi al ni niajn amikojn, kaj neamikojn. Sed unue ni komencu entuziasmigante niajn membrojn; ili konu profunde nian idealon kaj enamiĝu je ĝi. Por tion atingi ni profitu ĉiujn eblajn rimedojn.

Sportoj, ekskursoj, io ajn. Ne gravas. Sed ni klopodu, ke la anoj estu kiel eble plej unuigitaj kaj en bona harmonio. Nur tiel ni povos iam fieri, pri tio ke ni ankaŭ intencis formi tiun "rondan familion", pri kiu jam de longe nia kara majstro parolis.

PROPAGANDO.—Mi jam diris. Tio estu la plej grava sinokupo. Ĉiuj rimedoj estu bonaj. Estas necese, ke ĉiuj sciu, ke esperanto vivas kaj ke esperanto utilas. Ju pli da esperantistoj estos, des pli da plifaciloj ni trovos. Jen ovo de Kolón. Antaŭen do!

Nacia Gvidantaro devas organizi sian propagandan fakon, kiu celos konigi al ĉiuj, kio estas esperanto kaj por kio utilas esperanto. Por tio helpus:

Saĝa aperigado de artikoloj kaj kronikoj en gravaj revuoj. Vole nevole la publiko ekscius, ke esperanto ekzistas.

Popularaj eldonoj de esperantaj gramatikoj. Esperanto estus tiamaniere akirebla de ĉiuj.

Lekcioj, kinprezentadoj, ekspozicioj... ĉio estas taŭga tiucele. Sed oni zorgu, ke la laboro estu tre serioza kaj perfekte aranĝita, ĉar alie, anstataŭ favori la movadon, ĝi malfavorus.

En lokaj jurnalaj oni povus provi aperigadon de esperanta angulo malgrandeta, sed regula. Tio montrus, ke vere estas esperantistoj. Kaj certe novaj adeptoj venus.

Kaj tiel plu... estas ankoraŭ multaj diversaj rimedoj, sed mi kredas, ke sufiĉas montri la ĝeneralan bildon de la afero. Do, mi finu kaj pardonu, se mi tedis.

PETRO MARQUETA.

Zaragozo.

Temo por letero al eksterlando

Ĉe la Valencia ŝipkonstruejo "Unión Naval de Levante", la 16-an de februaro 1935 okazis sole-najo. Sub brilanta suno oni enmarigis, antaŭ miloj da ĉeestantoj, la ŝipon "Ártabro". La ceremonion honorigis Moŝta Sinjoro Prezidanto de la Hispana Respubliko, du ministroj kaj la Diplomatiaj Representantoj el Brazilo, Peruo, Kolombio kaj Ĉilo.

La ŝipo Ártabro estas speciale konstruita por fari plurjaran esplorvojaĝadon al Sud-Amerika rivero Amazonoj, kiu fluas tra vastaj praarbaroj kaj ricevas multegon da flankriveroj. Ĉar Naturo prezentas tie multenombrajn malhelpaĵojn oni bezonas eksterordinaran ŝipon; Ártabro plenumas ĉiajn postulojn. Ĝi estas ŝipo tute elektra, ĉiuj servoj estas fareblaj per tiu ŝanĝebla forto. Petrolmotoroj produktos elektroforon, kiu turnigos helicon, tial la ŝipestro mem povos tuje kaj senpere manovrigi la ŝipon, ĉar antaŭ li staras iloj taŭgaj por funkciigi elektre la direktilon kaj ĉiun maŝinon. Elektre funkcios varmigado kaj malvarmigado, aerumado de la kajutoj, ĉiaspecaj radioaparatoj, panfarejo, frostdeponejoj por viandoj kaj vegetaĵoj...

Tiu ŝipo kiam estos plensarĝata dismetos 800 tunojn, ĝi estas 57'30 metrojn longa kaj 10 m. larĝa, ĝia enakviĝa profundo estas maksimume nur 2 metrojn, tiu rimarkinda fakto permesos al la Ártabro enŝoviĝi sendanĝere eĉ en la neprofundaĵajn regionojn el la riveroj. Por plivastigi la esplorblan surfacon oni portos surŝipe 8 diverscelajn motorboatojn, 2 hidroplanojn je faldeblaj flugiloj kaj 2 lumreflektilegojn. Por ekscii la akvoprofun-

decon oni uzos sonelektran sondilon kaj subakvaj kostumoj permesos esplori la profundaĵojn.

Sur la ŝipo, krom la maristaro kaj ĝia oficiraro, veturos scienculoj kaj film-fotografistoj. La scienculoj havos taŭgajn ĉambrojn kaj pienan ilaron por siaj studoj (Natursciencoj, Geografia Kartofarado, Meteorologio, Medicino k. t. p.). Per sonfilmoj la tutmonda publiko povos komforte vidi eposan ekskursegon, kies estro kaj iniciatinto estas Kapitano Iglesias, famkonata pro siaj transmaraj longegaj flugadoj.

FERNANDO BOSCA.

Naturscienca Doktoro.

Valencia (Hispanujo).

LEGENDO

La blinda pafisto sur «Sonneck». (Rokkastelo: «Sunangulo»)

(Daŭrigo)

La Sonneck-mastro ekkoleris, sed kiam li ĝuste volis balbute respondi, la kunulo de la parolanto interrompis lin kaj gaje kaj petoleme ekparolis: "Pro la sankta Huberto, mi dezirus vidi foje ĉi tiun majstro-pafiston, kies klarvidajn okulojn kaj celcertan manon la bardo gloris en siaj kantoj, kaj ke li pruvu al mi, ĉu li meritas sian gloron! Kie li povas esti? Ĉu li estas tro malkuraĝa por defendi sian legendan gloron en batalkonkuro kun egallertaj kontraŭuloj?" Timiga silento estiĝis en la tablorondo. Enterurigite la ĵus ankoraŭ gajegaj drinkantoj fikse rigardis la du fremdulojn, kiuj ŝajne ne scietis, ke ĉi tie terura sekreto zorge estis gardata. Sed la Sonneck-mastro levis sin ŝanceliĝante de sia seĝo. Liaj okuloj fulme brilegis, diablina rideto grimacigis lian vizaĝon, kaj al ĉiuj, kiuj konis lin la sango glaciigis en la vejnoj, vidante ĉi tiun teruran rideton. "Miaj karaj amikoj", li komencis per balbutanta lango, "vi parolas maljuste pri la Fürstenberg-mastro, li ankoraŭ vivas kaj sub miaj gardado kaj flegado li fariĝis pli bona pafisto, ol li iam estis. Li lernis trafi celojn, kiujn li eĉ ne povas vidi. Li pruvu al vi sian arton!" Li raŭke ridis, mansignis al siaj servistoj kaj refaliĝis sin en sian seĝon. Ĉiuj, kvazaŭ paralizite, fikse rigardis malsupren. Eĉ de la plej kruda inter ĉi tiuj sovaĝaj kunuloj tremis la koro pro teruro kaj indigno. Estis neniu en la tuta aro, kiu ne estus sekrete pledinta por la Fürstenberg-mastro, kiu tiel kruele estis turmentata. Poste la pordo malfermiĝis, kaj la blindulo estis enpuŝata de la servistoj. Terura estis la aspekto de la malfeliĉulo, kiu, kvankam li ankoraŭ devus esti plenforta viro, kun sia blankiĝinta hararo kaj velkinta vizaĝo aspektis, kiel senforta maljunulo. Kun sia ĉifoniĝinta vesto, kun la malplenaj orbitoj en sia pala vizaĝo, li pli vere similis eltombiĝintan fantomon, ol vivantan homon. "Oni dubis pri via arto, mia amiko", kriis la Sonneck-mastro, kiu ŝanceliĝante estis levinta sin, kun laŭtega rido. "Prenu ĉi tiun arballeston kaj trafu la pokalon, kiun mi tenas en mia mano. Ĉi tiu majstropafa redonu al vi la liberecon!"

Per avidaj manoj la Fürstenberg-mastro ekprenis la longe malhavitan batalilon, kaj dum la Sonneck-mastro kun ebria mokridado, levis la pezan, oran pokalon, la kordo tintis, kaj la ridado de li

malbonulo ekmortis kun stertora krio: la sago de la blindulo estis en lia gorĝo!

Ekkaptite de teruro kaj ekmalebriĝinte, la drinkkunuloj premis sin ĉirkaŭ la korpo de la juĝito, kiu laŭlonge kuŝis antaŭ iliaj piedoj. Poste ili turnis sin al la blinda pafinto kaj ektimis: la fremdaj junuloj staris apud la maljunulo kun nudaj glavoj por ŝirmi lin! En la unua momento la dungitoj kaj ĉaskunuloj ekprenis siajn batalilojn por venĝi la rapidan agon. Sed, rigardante siajn fortajn bonarmitajn kontraŭulojn, unu post la alia mallevis la manon de sur la glavotenilo. Nun la plej maljuna el la tablorondo antaŭeniris kaj diris: "Aŭskultu: Ni estas la kunuloj de la Sonneck-mastro, kaj kelkaj estas liaj dungitoj, kaj tiel ni devus venĝi la morton de la mortigito. Sed ne niu el ĉi tiu rondo iam estis lia vera amiko, kaj ĉiuj scias, ke pro terura krimago li meritis ĉi tiun vivofinon. Tial ni volas esti pacemaj, kaj vi ambaŭ havu la permeson, foriri libere kaj honore el la kastelo kun via protektato".

Ĉi tiu parolo trovis aprobon, sed la du batalantoj postulis ankaŭ la liberigon de la aliaj malliberuloj, kio post mallonga hezito estis konsentata. Baldaŭ la pordegoj de la kastelo Sonneck, kies ŝtonaj muroj estis vidintaj tiel multe da teruro kaj mizero, fermiĝis post malgranda aro de feliĉaj homoj, kiuj, liberigitaj per la majstropafo de la blinda pafinto kaj la oferema braveco de liaj kavalaraj amikoj alpaŝis al nova, pli bona vivo. Kaj al la Fürstenberg-mastro estis preparata trankvila vivovespero en malproksima kastelo en "Odenwald", pere de la amikeco kaj zorgema ŝirmado de la du junaj kavaliroj.

Tradukis el la germana
M. SCHÜTT.

Berlin-Friedenau.

Nova Esperanto-Revuo

Ni ricevis antaŭ kelkaj tagoj la 3-an numeron de la nova gazeto "Verda Revuo" temanta pri arto, scienco kaj amuzo. Ĝi aperas la 15-an de ĉiu monato en Vieno, estas okpaĝa kaj iomete pli grandformata, ol NIA VIVO.

Tre bele presate sur bonan paperon kaj enhavante bonegajn fotografbildojn, la nova revuo impresas treege agrable la leganton. Ĝia enhavo ankaŭ estas tre interesa kaj bone redaktita, kaj entute ĝi rajtas fieri, pri tio ke estas ja inda je nia karega lingvo, kio laŭ ni estas la plej altvalora laŭdo por literaturaĵo.

Nian plej sinceran gratulon al "Verda Revuo", por kiu ni deziras longan, prosperan kaj altkvalitan vivon.

Grava Eldono de Aragona Esperanto - Federacio

Kiam niaj legantoj ekvidos ĉi tiun sciigon, Aragona Esperanto-Federacio jam estos publikiginta en nian karan lingvon la tradukon je Sango kaj Sablo, kiun faris kun permeso de la gefiloj de Blasco Ibáñez la Prezidanto de Frateco kaj Direktoro de NIA VIVO Sro. Ramón de Salas.

Ĉi tiu verko, eble la plej grava literaturaĵo tradukita ĝis nun en la internacian lingvon, disfamiĝos denove en la tutan mondon, per la esperan-

tistaro, la nomon de Hispanlando kaj de la eminenta, valencia verkisto Vicente Blasco Ibáñez.

Aragona Esperanto-Federacio penis, ke tiel neordinara verko sin prezentu inde vestita, kaj tiucele komisiis la tre konatan kaj multfoje premiitan pentriston el Zaragozo, Sro. Guillermo Pérez, por ke li faru alegorian bildon kvarkoloran, por okupi la tutan librofasadon. Ankaŭ la presado kaj papero estas ja bonaj kaj entute la verko bele aspektas.

Por ke la prezo de ĉi tiu libro 232-paĝa, kies formato estas 16 × 22 centimetra, povu esti kiel eble plej malalta, oni decidis vendi rekte la ekzemplerojn po:

9'50 pesetoj por Fremdlando	} Sendokosto enkalkulita
8'50 » » Hispanlando	

Mendojn, al Sro. R. de Salas — Kasisto de A. E. F.—Cervantes, 5—Zaragoza—Hispanlando.

Aragona Esperanto-Federacio atendas konfide la favoran akcepton kaj sukceson de la nova verko, per kiu nun riĉiĝas Esperanto.

JOSÉ ORÓS,

SPRITAĴOJ

Ĉe la hundovendisto:

—Kiom multe kostas ĉi tiuj hundetoj?

—Ĉi tiu, unu peseton; la alia, unu peseton kaj dek centimojn.

—Nu, kial tiu diferenco, se ili estas tute egalaj?

—Ĉar la dua ĵus englutis dekcentiman moneron.

* * *

Dialogo:

—Kaŭze de kio via patro mortis?

—Pro natura mortkaŭzo: li falis de sesa etaĝo.

—Malsaĝulo! Ĉu tion vi nomas natura mortkaŭzo?

—Nu, en mia vilaĝo, kiam iu falas de tiel granda alteco, plej nature estas, ke li mortas.

* * *

Fervoja inspektoro, kontrolante la kalkullibron de malgrava stacidomo, trovis inter la elspezoj la jenan noton:

"Viando por la kato, kiu manĝas la musojn... 10 pesetojn".

La inspektoro forstrekis la noton kaj skribis apuden:

"Se la kato manĝas la musojn, oni ne bezonas doni al ĝi viandon; se ĝi ilin ne manĝas, oni ne bezonas la katon".

* * *

Strangaĵo:

—Jen preterpasas verkistino Julinjo R. kun sia frato. Diru al mi: ĉu ili ne estas dunaskitoj?

—Tio almenaŭ ili estis.

—Nu, kial vi diras "estis"?

—Jes, ĉar ili estis dunaskitoj ĝis sia deksesjara aĝo. Poste ili ĉesis esti tiaj. Nun Johano estas tri-dekjara dum Julinjo ĵus fariĝis dudektri-jara.

* * *

—Mi aŭdis, ke al via edzino okazis aŭtomobila akcidento. Ĉu ĝi gravis?

—Tute ne: malgravaj difektiĝoj ĉe la pentrotavolo de ŝia vizaĝo kaj ĉe tiu de la veturilo.